

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
F - 77610-FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006-PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170-LE PERREUX sur MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT rue des Oiseaux 27700-LES ANDELYS

c.c.p. Association Cath. Franç. pour l' Esperanto ROUEN 2324 93 N.

==== la n°: 2 F; abono: 7 F; kotizo: 1 F; sume: 8 F. ====

Sendu la materialon por la bulteno al S-ino VINCENT antaŭ la 10-a de
marto, junio, septembro kaj decembro.

XX

---- N° 107 ---- BULLETIN TRIMESTRIEL ---- TRIMONATA BULTENO ----
===== Sankta PIO X-a, preĝu por ni. =====

---- JANUARO 1976 ----
=====

+++++

--- BILETO DE LA PREZIDANTO

-- I.K.U.E. en deuil --

Notre Président, Pastro LONGONI, malade, a tenu cependant à faire une courte apparition à notre congrès de Rome. Nous ne nous doutions pas alors que nous ne le reverrions plus. La nouvelle de sa mort nous est arrivée brutalement peu après, et nous avons vivement ressenti combien nous perdions.

Il avait accepté, à un moment difficile, de reprendre la charge de I.K.U.E., et il avait su se faire apprécier et estimer de ceux qu' il rencontrait, comme il l' était de nos samideanoj italiens.

Jusqu' au congrès, comme président de l' Union Internationale Espérantiste Catholique, comme rédacteur et guide du bulletin italien "Katolika Sento", il s' était dépensé sans compter à ces tâches, et l' un de ses derniers travaux avait été la préparation du "Kristana Esperantista Jarlibro", annuaire commun à I.K.U.E. et K.E.L.I., édité dans l' esprit d' oecuménisme qui demeure, depuis la naissance de notre mouvement, l' une de ses caractéristiques.

Continuateur d' autres grands disparus, le Père Longoni a mérité notre admiration et notre reconnaissance, et nous joignons dans la même pensée et dans le même hommage ceux qui ont été avant lui les animateurs spirituels depuis le début du siècle de l' entreprise qui est la nôtre. Emile Peltier, Austin Richardson, Parker, dont l' action a été tragiquement interrompue par la guerre de 1914. L' Abbé Font-Giralt, victime des douloureux événements qui ont ensanglanté l' Espagne, ces prêtres admirables, et tous les autres qui ont permis la continuité de la vitalité du mouvement malgré la déchirure des conflits mondiaux.

Pastro Longoni a eu la joie, avant de quitter ce monde, de réunir autour du successeur de Pierre les représentants de 18 pays; s' il n' a pu être parmi nous à l' audience papale où nous furent adressées des paroles d' encouragement paternelles, ou sous les voûtes de Saint-Pierre quand nous avons prié avec le Pape en la fête de l' Assumption, son coeur et sa fer- veur étaient proches des pèlerins de l' Année Sainte membres de notre XXXVI^e congrès.

Vivant d' une vie nouvelle en Dieu, ceux que nous venons d' évoquer attendent de nous la poursuite d' une action à laquelle ils ont donné le meilleur d' eux-mêmes sur cette terre; sous une autre forme, ils contribue- ront à la fécondité de notre action militante. A nous d' être actifs et effi- caces; aux plus jeunes surtout de ne pas décevoir l' espérance qui a été mise en eux.

A nos défunts, nous devons le secours de nos prières, la fidélité à leur idéal, et la marche vers les buts que traduit un mot: l' Espérance en une humanité fraternelle pacifiée et amicale.

R. Cl. COLAS.

--- PREGO ---

Ni estas antaŭ Vi, Sankta Spirito,
Nia Sinjoro.
Jen ni, kaptitaj sub la pekopezo,
Sed venu al ni kaj restu kun ni;
Degnu eniri en niajn korojn.

Instruu al ni, kion ni devas fari,
Montru al ni, kien ni devas iri,
Efektivigu, kion ni devas plenumi.

Ne permesu, ke ni kontraŭstaru vian justecon
Vi, kiu super ĉio amas tion, kio estas ĝusta.
Ke la nesciado ne instigu nin malbonfari!
Ke la flataĵoj ne klinigu nin!
Efike kunligu nin al Vi, por ke ni ĉiuj estu en Vi
Unu sola estulo.

Izidoro de Seville .

--- PENSO ---

Tiu estas katoliko, kiu ne vidas en ĉiu homo ties socian apartenon aŭ nekredantan, protestantan, judan aŭ komunistan pensmanieron, sed la fra- ton por kiu mortis Kristo; kaj Kristo metas lin sur nia vojo por ricevi nian amon.

Episkopo Huyghe

NIA MEMBRARO

Novaj-membroj 1975 (daŭrigo): 16) S-ro MULLER (Moselle); 17) S-ro REGNIER (Aude); 18) S-ro GUELEN (Ht-Rhin)

Membroj bonfarantoj 1976: 1) S-ro BESSIERE (I & V); 2) F-ino ERGOLL (L-A)

Eldona fonduso (2-a listo): 5) RD: 100 F; 6) S-ro Kraemer: 25 F; 7) S-ino MICHAU: 20 F. Antaŭa sumo: 211 F. Entute: 356 F.

Plej koran dankon al la malavaraj donacintoj kaj.. donacontoj!

PROTOKOLO DE LA KONSILIA KUNVENO (28/9/75) en Paris

Ĉeestis: S-ino Vincent, F-ino Vanneau, S-to Degrelle, F-to Marmou, S-roj Colas, Despiney kaj Ligot.

1. Preĝo memore al Marcelle Claude
2. Raportoj: diservo en Tours (nacia kong. 28/3/75)
kong. en Lille (17-19/5/75)
IKUE-renkonto en Romo (11-16/8/75)
Diservo kaj geedziĝa ceremonio en Kopenhago (27/7/75)
- 3; Aranĝo de diservo en la landa kong. en La Grande Motte (Pasko 76)
4. Informado: a) gazetaro: nia bulteno aperigu liston de aperintaj artikoloj pri katolikaj Esperanto-aferoj
b) radio-TV: okazis en 75 kvin elsendoj. Ni provos partopreni en la dimanĉa elsendo "Le jour du Seigneur" (TF 1)
c) eldono de nova informilo: ni malfermis specialan fonduson kaj atendas ideojn de niaj anoj por moderna kaj alloga informilo.
5. Kongreso 76 en Bourges: Paul Morin kaj S-to Goudé klopodas ĝin prepari
6. Bulteno: por kuraĝigi la partoprenontojn en "lingva angulo", poentoj kun premioj rekompencos la plej bonajn proponojn.
La redaktoro sopiratendas pli da kunlaboro: artikoloj, diversaj informoj eĉ simple formulitaj estos bonvenaj.
7. Membraro: 160 anoj, el kiuj 35 dumvivaj
8. Diversaĵoj: a) sendo de letero al IKUE kun rimarkoj kaj sugestoj por plibonigo de la funkciado de IKUE
b) legado de letero de S-ro Bachelier pri KELI-kong.
c) sendo de esperantaĵoj al S-to Kloc (Pollando) por ekspoz.

PROTOKOLO DE LA KONSILIA KUNVENO (7/12/75) en Paris

Ĉeestis: S-inoj Michau kaj Vincent, F-ino Vanneau, S-toj Bourdon kaj Degrelle, F-to Marmou, S-roj Colas kaj Despiney.

Krome S-to Goudé kiel observanto.

Petis senkulpigon: S-roj Barrier, Bessière kaj Véron.

S-to Degrelle enkondukas preĝon per la Psalmo 130 memore al nia kara IKUE-prezidanto, S-to Longoni.

1. Rilatoj kun IKUE: S-ro Colas skribis al S-toj Ruaro kaj Jacobitti niajn rimarkojn kaj sugestojn. La letero estos sendita al ĉiuj IKUE-estraranoj nome de la konsilio de FKEA.
2. Kongreso en Bourges: oni rezervis kongresejon. Parto de la aranĝoj estos por ne-esperantistoj. Oni antaŭvidas ekspozicion. Ni petos la honorprotektadon de la ĉefepiskopo.
3. Diservo en La Grande-Motte: ni atendas respondon de S-to Casanoves (Hispanio)
4. Peranteco inter FKEA kaj IKUE: pro grava malsano de sia edzino, S-ro Véron rezignas pri sia ofico, kiun li fidele kaj diligente plenumis dum jaroj. Lin anstataŭos S-to Degrelle.
5. Adresaranĝo de la sidejo: pro baldaŭa transloĝiĝo de la kasistino.
6. S-ro Desoiny raportas pri siaj kontaktoj kun ekleziaj instancoj. S-to Bourdon parolas pri sia agado ĉe "Les Compagnons de St-François".
7. Helpe al JEFO: ĝi partoprenos "EXPO JEUNES" (Paris 3-10/3/76) per budo. FKEA voĉdonas subvencion de 200 F. Oni povas sendi donacojn al JEFO c.c.p. LA SOURCE 31 709 94 Y.
8. Demisio: S-ro Barrier rezignas pri sia konsilianecon pro profesiaj kialoj. Kandidatoj sin anoncu al la ĝenerala sekretario.

Protokolis: R. DESPINEY.

=====
NOTU BONE:

La venonta konsilia kunveno okazos la 7-an de marto 1976 ĉe la UFE-sidejo 4 bis, rue de la Cerisaie 75004-PARIS (metrostacio: Bastille) je la 14.30. Iu ajn povas ĉeesti kiel observanto.

LINGVA ANGULO

Respondis al la proponoj de la n^o 106: S-roj Bourgois (B), Dauchez (D), Guillon (G), S-ino Michau (M) kaj 5 Nantes-anoj (5).

1) li estas malsaĝa kiel ŝtipo (B); lia komprenemo estas kvazaŭ ŝtopita (D); li ne kapblas ion kompreni (G); smirge mensŝtopita (M); smirge, bonege ŝtopita (5).

2) ne movi la buŝon (B); silentadi, resti kvazaŭ muta (D); nepre silenti (G); obstine silenti (M); daŭre silenti (5).

3) mute kun buŝo kudrita, kunĝluu viajn lipojn (B); silenti (D); atenti pri troa babilado (G); rigora sekreteco (M); havi sigelon sur la lipoj (5).

4) li ja frandas sukeraĵojn (B); sukergustema, franda (D); li parolas farizee (M); mieleca buŝo (5).

5) li konsternas nin, li mirsilentigas nin (B); li perdigas al ni nian respondkapablon (D); li estas pli mirinda ol ni opiniis (G); li mirkonfuzigas nin (M); li mirigas nin per sia neatenditeco (5).

6) sufiĉigi la elspezojn (B); ekvilibri en- kaj el-spezojn (D, G); sukcese ekvilibri buĝeton (M); ekzakte saldi el- kaj en-spezojn (5).

7) li furiozas kiel leono (B); esti ekscitita (D); li ŝajnas kolerigita (G); leonforte li atakas (M); li enĝlutis leonaĵon (5).

8) vivi per aero (B); esti senmona (D); manĝi malbonegan nutraĵon (G); kontraŭvole fasti (M); manĝi ŝtonojn (5).

9) kverelaĉi, malutili unu al la alia (B); kvereli (D); ofte interkvereli (G); akre kvereli (M); kvereli kvazaŭ tuj mordontaj (5).

10) cerboŝtopado (B); troŝarĝado de la kapo, senlima propagando (D); obstina propagando (G); truda encerbiĝo (M); kranitrudplenigo (5).

Jen la unua klasifiko: S-ro Bourgois kaj S-ino Michau: 5 poentoj; S-ro Dauchez kaj la kvinopo: 4; S-ro Guillon: 1.

Fine de la jaro okazos ĝenerala klasifiko kaj premiodisdono. Pliaj kunlaborantoj estos bonvenaj.

Novaj proponoj de S-ino Michau: 1) avoir maille à partir; 2) à bon escient; 3) c' est là où le bât. blesse; de S-ro Despiney: 4) aller de conserve; 5) il lit plongé dans son canard; 6) il n' y a plus qu' à tirer l' échelle; 7) aller de concert; 8) le gouvernement ne veut pas aider les canards boiteux; 9) lui rendre la monnaie de sa pièce; 10) la nuit tous les chats sont gris.

xx

TRA LA GAZETARO (1975)

- LA CROIX: Boîte aux lettres - L' Esperanto a 87 ans (29 janvier)
- LE COURRIER PICARD: Un appel des espérantistes catholiques (15 avril)
- PAX CHRISTI: article sur le congrès de Lille (juillet)
- LE COURRIER DU VAL DE MARNE: mariage espérantiste en l' église St-Roch (20 juillet-5 août)
- LA CROIX: mots croisés avec le mot ESPERANTO (8, 10-11 août)
- LA CROIX: congrès de ROME (23 août) et 27 août)
- L' INDEPENDANT: tri religiaj esperantistaj informoj (3 septembre)
- LA CROIX: mots croisés avec le mot ESPERANTO (17 et 18 septembre)
- L' IMPARTIAL: tri religiaj esperantistaj informoj (20 septembre)
- LES CLOCHERS DE L' ANDELLE: congrès de Rome (septembre)

Bona konsilo: skribu al la kutima aŭtoro de krucvortenigmoj por ke li enkonduku la vorton ESPERANTO en siajn gazetojn. Donu difinon, ekz: langue internationale, vise à abattre les barrières linguistiques, veut contribuer à la compréhension entre les peuples, créé en 1887 par un médecin polonais, parlé sans interprètes dans les congrès internationaux...

AL LA JUNULARO

-- PACO --

Ĉiujare, okaze de Kristnasko, denove aŭdiĝas tiu vorto: Paco.

Kiel ĉarme ĝi plaĉas al patrinoj, alloge sonas meze de batalanta soldataro, amege atingas kaptitaron. Kiel agrable ĝi amikiĝas kun infanoj kaj fine kiel amata ĝi estas kaj de Dio kaj de veraj kristanoj.

Ĉiam kaj ĉie, en ĉiuj popoloj kaj landoj, en kiuj batas amantaj koroj, paco anoncas ĝojon, feliĉon, avantaĝon.

Sed, kompreneble, ne povas esti paco kun malbono, paco sen bono!

Aŭskultu la dian vorton:

"Dekliniĝu de malbono kaj faru bonon
Serĉu pacon kaj ĉasu ĝin" (Psalmo 34, 14).

Jes, ĉiu el ni devas eliri el sia egoismo, el sia memamo por kuri al la aliuloj, serĉante ilian kontentiĝon, elĵetante malbonon por starigi bonon. Jes, ĉiu el ni devas serĉi pacon kaj ĉasi ĝin, t.e. plenumi aktivan agon: la paco ne venas mem; la pacon ni mem konstruas.

Refoje la dia vorto:

"Kaj la frukto de justeco estas semata en paco por tiuj, kiuj faras pacon", diras Jakobo (3, 18) eĥante Jesajan: "Kaj produkto de justeco estas paco, kaj akiro de justeco estas trankvileco kaj sendanĝereco por ĉiam" (32, 17).

Paco estas frukto. Paco estas produkto. Paco ne estas, sed estiĝas; ne staras, sed stariĝas. Paco estas barakto kontraŭ malbono, venko super egoismo, triumfo de unuiĝo anstataŭ disiĝo.

Kaj vi, geknaboj, estas ankaŭ vokitaj por naski, kreskigi pacon en via familio, en via kvartalo, en via lernejo, ĉiuloke kaj ĉiutage.

Lernante Esperanton kaj ĝin vastigante, vi laboras por la paco, kaj ne forgesu: "Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj" (Mateo 5, 9).

DEGRELLE ROGER.

=====
LA JARO DE LA VIRINO.

Vidu kiel la profeto, rigardinte patrinon zorgantan sian infanon, parolas pri la afableco de Dio koncerne la homojn:

"Tiele diras la Eternulo: Jen mi fluigos sur ĝin (popolo de Dio) pacon kiel riveron, kaj la riĉaĵon de la popoloj kiel disverŝiĝintan torenton, por ke vi suĉu; sur la brakoj vi estos portataj, kaj sur la genuoj vi estos dorlotataj. Kiel homon, kiun konsolas lia patrino, tiel mi vin konsolos; kaj en Jerusalemo vi estos konsolataj. Kaj vi vidos, kaj ĝojos via koro, kaj viaj ostoj vigliĝos kiel freŝa verdaĵo" (Jesaja 66, 12-14).

Tiuj vortoj kontentigas nin kaj multe diferencas de ia literaturo: virino naskas, amas, vartas, bildigas kaj eĉ reliefigas la amon de Dio.

Kaj tio estas vorto de Dio.

DEGRELLE ROGER.

XX

ESPERANTO-KURSOJ (1-a listo)

CENTRE CULTUREL D' ESPERANTO DU PERREUX

- 1-a grada kurso: lycée technique Paul Doumer
- 2-a grada kurso: " " " "
- 3-a grada kurso: Ecole Saint-Joseph

Bonvolu sendi informojn pri la kursoj ekzistantaj en via loko, eĉ se partoprenas nur unu lernant(in)o, al la redaktoro: S-ino J. Vincent BP 92 27700-LES ANDELYS.

KUNVENO DE LA FRANCA EPISKOPARO EN LOURDES (nov. 1975)

La franca episkoparo, dum sia ĝenerala kunveno, elektis novan prezidanton kiel posteulon de kardinalo Marty: Monsinjoron ETCHEGARAY.

La episkopoj konstatis, kiel la profundaj ŝanĝoj okazintaj dum nia epoko naskis ankaŭ en la Eklezio novajn sintenadojn. La kristanoj volas pli aktive kaj konscië atesti sian kredon, kaj samtempe plene vivadi en la civito kaj en la socio, por sukcesi en la konstruado de pli bona mondo.

Tiuj klopodoj iras tra la organizado kaj la reformo de la vivmedio. Tiacele, "l' Action Catholique" plurfakiĝis laŭ la diversaj sociaj kategorioj. Tamen la reformo de la institucioj vokas ankaŭ la formadon de grupoj, partioj, kaj politikaj organizaĵoj. Tiuj diversmaniere elpensas la vojon al pli bona homara vivnivelo.

La Evangelio ne estas neŭtrala. Ĝi instruas la amon inter la homoj; ĝi tamen denuncas la agojn, kiuj kontraŭstaras la konstruadon de homaranismo direktita al la perfekteco ekzistanta nur en Dio.

Sekve, la kristanoj ne nur rajtas, sed devas dediĉi siajn fortojn al la movadoj, eĉ politikaj, diversaj laŭ la rimedoj sed celantaj pli justan kaj pli altvaloran nivelon de la komuna vivo de la homoj.

En tiaj movadoj, ilia speciala vokiĝo estas, respektante la elektaĵojn de la aliaj, valorigi ilin per atesto de sia kredo.

Sed, malgraŭ la pluraleco de la opinioj, ili devas vivadi en plena unueco, en la fideleco al la dia vorto kaj al la sama revelacio de Kristo, savanto kaj liberiganto de ĉiuj homoj.

La sociaj kontraktaĵoj estas malsimilaj, laŭ la konscienca elekto de ĉiu, sed la kristanoj devas pliriĉigi sian spiritan travivadon, atentante pri la vorto de Dio legata kaj celebrata en la Eklezio.

~~~~~

--- HO DIO... ---

Ho Dio, la rekteco cin gvidas en verdikto;  
 Favorojn al ni ĉiam plezuras ci disdoni;  
 Sed tiom mi malicis, ke ve! nur en konflikto  
 Kun cia justo-sento, ci povus min pardoni.

Jes, Dio, miaj krimoj kontraŭ cia Edikto  
 Al cia povo lasas turmenton nur proponi  
 Eĉ kompatemo cia celas al mia aflikto  
 Al mia savo devas cia Majest' oponi.

Plenumu cian volon, ĉar tiu cin prigloras;  
 Indignu pro la larmoj, kiujn mi pente ploras;  
 Do, tondru, batu, fine! por mia pek' repagon.

Vengemaŭ cian pravon mi laŭdas kun humilo,  
 Sed kien ci alpafoz koleran fulmosagon,  
 Ĉu tie ne surfluis jam sang' de cia Filo?

Jacques Vallée, sinjoro des Barreaux (1602-1673)

el la franca tradukis Marcel Delcourt

\*\*\*\*\*

---- BONA KONSILLO ----

La sekreto por esti ĉiam juna, kaj tia resti, eĉ kiam la pasantaj jaroj markas la korpon, la sekreto de la ĉiama spirita juneco, estas havi celon, al kiu oni dediĉas sian vivon.

Don Helder CAMARA

(eltirita el "Ile-de-France-Esperanto)

UN MAGICIEN SUR LE PONT DE L' ESPERANTO

Majorettes et musique en tête, c' était la fête ce samedi-là à Herstal, près de Liège, où le bourgmestre et 200 visiteurs de 6 pays inauguraient le premier " pont de l' Esperanto" du monde.

Originaires du Bénélux, de France, d' Allemagne et du Japon, les participants profitent de cette journée pour échanger leurs idées sur des sujets aussi divers que les minorités linguistiques, l' archéologie, la visite de Louvain, l' émission " Y a un truc", etc...

Pour leur part, Belges et Français s' entretiennent avec un membre actif des associations de magiciens de Suisse et d' Allemagne. Usager convaincu de la Langue Internationale, Trixini a présenté ses "trucs" dans plusieurs pays ainsi qu' à la télévision. Son public rit pendant tout son spectacle et Trixini ne s' en tient pas à la prestidigitation. Il est aussi un montreur de marionnettes apprécié à Luxembourg ( Grand Duché).

Avant un séjour en France, il se produira pendant les prochains congrès sans interprètes à Athènes ou à Reykjavik. Trixini rédige un journal paroissial où paraît une chronique d' Esperanto. Il aime particulièrement une devise de Don Bosco: " Le diable a peur des gens gais".

Hansjörg Kindler, l' autre nom de Trixini, a été ordonné prêtre en 1962 et son ministère l' occupe plus que ses différents violons d' Ingres. Il faut dire que M. l' abbé Kindler est actuellement curé de la communauté germanophone à la paroisse européenne de Luxembourg.

La Voix du Nord ( 27/9/75)

Nord-Eclair, Nord-Matin ( 1/10/75)

----- K O N K U R S O J -----

Por la jaro 1976, FKEA organizas du konkursojn:

- 1) en Esperanto: " Lingva angulo" ( v. p. 4)
- 2) en la franca lingvo: oni devas verki tekston por la nova informilo de FKEA.

Formato: 13,5 X 21

La teksto devos esti moderna, alloga,kaj plenigi ambaŭ flankojn de la folio. Ĝi precipe celas konvinki la katolikaĵojn lerni Esperanton.

Oni povas sendi ankaŭ taŭgajn ilustraĵojn.

Oni sendu la projektojn al: Association Catholique pour l' Esperanto BP 92 27700-LES ANDELAYS, antaŭ la 25-a de majo 1976.

Oni ekspozicios ilin en la kongresejo en Bourges,kie la kongresanoj elektos la plej bonan.

Por ĉiu konkurso estos tri premioj: la 1-a en valoro de 50 F; la 2-a en valoro de 25 F; la 3-a en valoro de 10 F por iu ajn servo pere de FKEA.

INFORMO

La KELI-kongreso okazos de la 20-a ĝis la 27-a de julio 1976 en la Teologia Fakultato en Montpellier.

Korespondadreso: D-ino Y. Vierne 5, rue Dr Roux  
34000-MONTPELLIER

& & & &

KONGRESO DE LA FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO ( FKEA)

\*

BOURGES ( Pentekoste) 5/7-an de junio 1976

-o-o-o-

KONGRESEJO: Soeurs du Très Saint-Sacrement et de la Charité  
52, route de St-Michel 18000-BOURGES

KORESPONDADRESO: S-ro P. MORIN 21, rue Moyenne 18000-BOURGES

ALIGKOTIZOJ: individuo 10 F  
geedza paro 13 F  
infano ĝis 16-jara, blindulo, alilandano: senpage

LINDATO DE ALIĜO: 25-an de majo 1976

\*

PROVIZORA PROGRAMO

Sabaton 5-an de junio:

ekde la 15-a horo: akcepto de la kongresanoj; interkonatiĝo  
post la vespermanĝo: unua kunveno

Dimanĉon 6-an de junio:

9.00: ĝenerala kunveno  
12.00: komuna tagmanĝo  
14.30: diservo, kuncelebrata de la ĉeestantaj sacerdotoj  
16.00: vizito de la katedralo kaj episkopa ĝardeno  
post la vespermanĝo: dua kunveno

Lundon 7-an de junio:

post la matenmanĝo: vizito de Palaco Jacques Coeur

-----

RESTADPREZOJ

vespermanĝo: 10 F  
nokto kaj matenmanĝo: 17 F  
tagmanĝo: 12 F

Bonvolu kunporti buŝ- kaj tualet-tukojn.

§§§§§§§§

NEPRE REZERVU VIAN PENTEKOSTAN SEMAJNFINON!

AMASE ALIĜU AL NIA LANDA KONGRESO, KUNPRENU AMIK(IN)ON!

MONTRU, KE ANKAŬ ĈE LA KATOLIKOJ ESPERANTO V I V A S ! ! ! ! !

°°°°°



MOSKEO EN ROMO

Baldaŭ komenciĝos la konstruado de moskeo en Romo. Temos pri la plej riĉa en okcidento: 8 jaroj da laboroj, 40 miliardoj da italaj liroj de elspezo, areo de 30 mil kvadrataj metroj donacita de la itala ŝtato.

La verko, projektita de la arkitekto Abdelmagid Bouzid, estis proponita de la Irana ŝaho, kaj estas mone subtenata de ĉiuj muzulmanoj, arabaj kaj ne arabaj. Granda modelo montras, kian aspekton havos la moskeo: grandega ŝton-tabulo hela, el kiu elstaros orumita kupolo kovrita per skribaĵoj kaj simboloj el Korano kaj du minaretoj, el kiu la pli alta mezuros pli ol 80 metrojn. La kupolo, kun duobla volbo, havos diametron de 55 metroj; krome, rivereto 300 metrojn longa laŭiros alian malaltan konstruaĵon kun 5 malgrandaj minaretoj kiu gastigis la Islaman Centron, ejon por kunvenoj inter kristanoj kaj muzulmanoj, centrojn por kulturaj iniciatoj, teologian islaman Instituton kaj Bibliotekon. Oni antaŭvidas, krome, ekzotan ĝardenon, kiu memorigos la atmosferon de la arabaj landoj. La Roma Moskeo, pro sia grandeco kaj pro la menciitaj kulturaj-religiaj centroj, estos avangarda loko por dialogo inter religioj ne plu malamikaj.

Teksto de Daniela BERTI, traduko de Antonio de SALVO

---

ALIĜILO

sendota al S-ro Paul MORIN 21, rue Moyenne 18000-BOURGES

NOMO KAJ VOKNOMO:

ADRESO:

Mi aliĝas al la kongreso de FKEA kaj pagas kiel kotizon al S-ro MORIN c.c.p. Marseille 23 10 90 la sumon de ..... F

Mi uzos la jenajn servojn:

|                             |     |    |                              |     |    |
|-----------------------------|-----|----|------------------------------|-----|----|
| sabatan vespermanĝon        | JES | NE | dimanĉan vespermanĝon        | JES | NE |
| tranoktadon sabaton vespere | JES | NE | tranoktadon dimanĉon vespere | JES | NE |
| dimanĉan matenmanĝon        | JES | NE | lundan matenmanĝon           | JES | NE |
| dimanĉan tagmanĝon          | JES | NE |                              |     |    |

Mi proponas la jenajn servojn:

|                        |     |    |
|------------------------|-----|----|
| legadon dum la diservo | JES | NE |
| kantadon               | JES | NE |
| monkolekton            | JES | NE |

Mi alvenos la .... de junio je la .....horo per aŭtomobilo/vagonaro

Mi forveturos la .... de junio je la .....horo

Mi bezonas .... fervoja(j)n rabatilo(j)n.

Bonvolu plenigi unu aliĝilon por ĉiu el viaj familianoj

Uzu samformatan paperon.

Nepre aliĝu antaŭ la 25-a de majo 1976.

GIS REVIDO EN B O U R G E S !!!!!

